

Zaragoza, majo 2018



Numero 0 (dua epoko)

NIA VIVO

Revuo de la esperanta societo «Frateco»



FRATECO

Esperanto-Asocio en Aragono

Calle Cadena, 20, 1º-izda.
50001-Zaragoza, España

Prezentado

Redaktistaro

Antaŭ pli ol dudek jaroj, kiam mi ĵus lernis esperanton, mi ekkonis Fratecon, kiu tiam sidejis ĉe strato San Vicente de Paul. Mi memoras, ke la du unuaj homoj, kiujn mi renkontis tie, estis Victor Ortiz kaj sinjoro Herrera. Mi devas agnoski, ke mi sentis grandan plezuron, kiam unuafoje eniris la klubon: krom la fakto, ke mi finfine renkontis realajn homojn kun kiuj mi povis komuniki esperante (mi ja lernis la lingvon memstare), mi havis la impreson eniri historiplenajn ejon, nekonatan de la plejmulto, iom misteran, kvazaŭ oni lasus min ĉeesti sekretan societon, kiun nur inicitoj povus eniri. Tial dum tiuj jaroj mi frekventis Fratecon preskaŭ ĉiu-ĵaŭde. (Jes ja, tiam homoj kunvenis kaj marde kaj ĵaŭde). Mi gardas belajn memorojn de miaj unuaj jaroj en Frateco.

Mi rakontas ĉi tiun historieton por montri, ke mi estas delonga fratecano, kun pli ol 20 jaroj da frekventado al la klubo. Kaj tamen, estis nur antaŭ kelkaj monatoj, eble la pasintan jaron, ke mi sciigis pri tio, ke Frateco iam publikigis regulan, sufiĉe bonkvalitan, bultenon titolitan "Nia vivo"!

Ĉe tiu ekscio tuj alvenis al mia menso la ideo reeldoni ĝin. Mi proponis la ideon sed ĝi ne progresis. Certe ne estis la ĝusta momento. Antaŭ kelkaj semajnoj, tamen, dum proponado de temoj por la kunveno de junio, unu el la novaj fratecanoj, Fernando Arroba, revokis la eblon publikigi "Nia vivo". Tiu ideo ŝajnis al ni, la partoprenantoj de la merkreda kurso, tre bona. Samtempe ni sentis kaj sentas nin kapablaj ĝin realigi. Fakte, ni jam havas skribaĵojn faritajn dum la kurso, kiuj povus reutiligi kiel artikoloj.

Nia celo pri tiu entrepreno estas tre humila kaj realisma, ni ja ne volas fari ion kio estu trans niaj kapabloj. Samtempe ni kredas, ke la profitoj reeldoni la bultenon estas pluraj. Tiun bulteneton ni povas sendi al la fratecanoj, kiuj neniam vizitas la klubon. Tiu bulteneto povas helpi nin praktiki la lingvon kaj aktivigi niajn kunvenojn. Tiu bulteneto ofertas al la eventualaj novaj alvenontoj aktivaĵon interesan por fari en Frateco. En tiu bulteneto la plej maljunaj fratecanoj povas rakonti al la junaj siajn memorojn, travivaĵojn kaj aliajn aferojn pri esperanto kaj Frateco. Nu, tiu revueto montros la pensojn, emojn, interesojn kaj sentojn de la fratecanoj, kiuj volos kunlabori ĉe ĝi...ĉar ni certas, ke ĉiuj fratecanoj (kvankam ili povus pensi ke ne) havas ion dirindan kaj rakontindan al la aliaj.

Ĉar la buĝeto por la eldono estos nula aŭ tre malmulta, ĝi estos precipe elektronika per pdf-o. Tio faciligos la disvastigon de la re-

Enhavo

| | |
|---------------------------------------|---|
| Prezentado..... | 2 |
| Enhavo..... | 2 |
| Saluto..... | 3 |
| Legendo pri Lorelejo..... | 4 |
| Historio de Togolando..... | 4 |
| Marie Curie..... | 5 |
| Terapio de Akcepto kaj Sindevigo..... | 6 |
| La Alĝafario el Zaragozo..... | 7 |
| Forpasis Vicente Garcés..... | 8 |

Teamo

| | |
|---------------------------|-----------------|
| Prezidanto | Lorenzo Noguero |
| Ĉefredaktoro | Pablo Conesa |
| Novaĵoj | Sabino Pelegrín |
| Desegno | Fernando Arroba |

Redaktoroj:

| | |
|-------|-----------------|
| | Santiago López |
| | Enrique Navarro |
| | Fernando Arroba |

Kiel sendi artikolojn por la revuo?

- Sendu prefere originalajn tekstojn kaj bildojn.
- La tekstoj en Esperanto kaj en .odt aŭ «email» formato, prefere. (Bonvolu, uzu UTF-8 kodojn kun ĉapelitajn literojn)
- La bildoj estu bonkvalitaj je 180-300 dpi. Ni preferas bildojn en PNG formato.
- Por vektoraj bildoj ni preferas SVG aŭ EPS.
- Indiku ĉu via artikolo jam aperis aŭ estas proponata al alia revuo.
- Se via artikolo estas traduko, indiku kie ni povas trovi originalan fonton.
- Informoj kaj ligiloj pri la temo de via artikolo estos bonvenitaj.

fratecoesperanto@yahoo.es

Revuo Nia Vivo

Calle de la Cadena, n°20, 1º izda.
50001 - Zaragoza, España

La unua numero de la bulteno «Nia Vivo» aperis je Julio de 1931. Ĝia unua artikolo titoliĝis «saluto». Multajn jarojn poste ni volas ankaŭ saluti al ĉiuj kaj ni certigas similan entuziasmon por eldoni la jena bulteno.

Ĉi tiu numero estas nur provo kaj implicita deziro de ilo, kie ni povos informi pri niaj novaĵoj, niaj sentoj, niaj aferoj. Do, ni subskribas la jenajn vortojn de la unua artikolo de la unua numero:

Antaŭ longe «Frateco» deziris kaj penis presian bultenon, sian spiritan interkomunikilon kun ĝiaj societanoj.

Kelkaj el ni, studis tian deziron, hodiaŭ realaĵo.

Nia idearo estas: «por Frateco kaj por Esperanto». Sub tiu devizo povas ĉeesti ĉiuj kiuj estas esperantistoj.

Tiu ĉi bulteno alportos al ĉiuj, niajn salutojn kaj niajn entuziasmojn por Frateco kaj Esperanto; ĝi certigos pri nia vivo kaj pri niaj penadoj por pligrangigi Fratecon, tio estas, Esperanton.

En tiu ĉi marŝado, estis niaj iniciatintoj, tiuj kiuj ekvivigis Fratecon, tri fervoraj esperantistoj, kiuj antaŭ 23 jaroj, decidis fondi en nia urbo esperantan societon por la propagando, instruado kaj disvastigado de la internacia lingvo.

Jaro I ~ Numero 1. Zaragoza, Julio 1931.

Informoj: Arto - Literatura Turismo - Sciigoj

NIA VIVO

Administracio kaj Redakcio: Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo «FRATECO»

SALUTO

Antaŭ longe «Frateco» deziris kaj penis presian bultenon, sian spiritan interkomunikilon kun ĝiaj societanoj.

Kelkaj el ni, studis tian deziron, hodiaŭ realaĵo. Nia idearo estas: «por Frateco kaj por Esperanto». Sub tiu devizo povas ĉeesti ĉiuj kiuj estas esperantistoj.

Tiu ĉi bulteno alportos al ĉiuj, niajn salutojn kaj niajn entuziasmojn por Frateco kaj Esperanto; ĝi certigos pri nia vivo kaj pri niaj penadoj por pligrandigi Fratecon, tio estas, Esperanton.

En tiu ĉi marŝado, estis niaj iniciatintoj, tiuj kiuj ekvivigis Fratecon, tri fervoraj esperantistoj, kiuj antaŭ 23 jaroj, decidis fondi en nia urbo esperantan societon por la propagando, instruado kaj disvastigado de la internacia lingvo.

En la monato julio de la jaro 1908.^a estis redaktita kaj aprobita la regularo de «Frateco». Esperanta Societo.

Por rememorigi nune la 23^a jaron de la inaŭguro de nia Societo, oni fondas tiun ĉi esperantan bultenon, kies unuan numeron ni dediĉas, kiel oferdono, al la fondintoj de Frateco, kvankam bedaŭrinde jam mortintaj; sinjoroj *Agustín de Montagut*, *Emilio Gastón* kaj *Rafael Benítez*.

MORALEDUKADO

Ĉu nobla idealo devas eniri en la porinfanan lernejon kaj esti prezentata al la infanoj, kies cerbo kaj koro devas esti modelataj de la instruisto.

La scienca lernado multe interesas, sed pli altgrade ankoraŭ oni devas zorgi pri la korpa kaj morala edukado. Neniam estas malfrue por akiri konon pri la diversaj sciencaj fakoj; sed tre ofte ni memoras eduki la korpon kaj konscion de la infano kiam la plej deca tempo pasis.

Ni traktos pri la morala edukado kaj oni ne bezonas multe peni por kompreni ke la anuaj jaroj de nia vivo estas kiuj pli kontribuas al la formado de la homa karaktero. Oni diras ke la edukado faras ĉion, sed, tia certigo, estas relativa,

ĉar ni ne estas pasto kies formo sanĝigas laŭ nia deziro. La homo jam de la trua aĝo havas konscion pli malpli disvolvitan, propran inklinton tute sendependan de la medio kie oni vivadas. Generalan regulon por la infanedukado oni ne povas sekvi.


Tendenco, preskani ĉiam akirita, estas sin supozita supera al la aliaj kaj oni devas forigi tiun malvirtuton. Unu el la rimedoj pli rekomendataj por tion korekti estas deviga ĉeesto de ĉiuj rangaj infanoj en sama lernejo, submetitaj al la sama regularo ekzakte ke neniu, kaj neniel, povu distingi al kia socia klaso apartenas la lernantoj kiuj amikiĝas pro reciproka altiro, pro samaj deziroj kaj inklinoj, ne pro falsa influo de la socia vivmaniero.

Sed ne sufiĉas ke la amo rilatu nur la mallargan rondon de la ĉiutagaj kunvivantoj. Ĝi devas pli etendiĝi konsiderante ke la homo ne povas izole vivi, ke nepre necese estas kunago de la tuta homaro kaj ke nia libereco ne rajtas malgrandiĝi tiun de niaj simuloj, kvankam ili loĝu en fremdaj regionoj, se oni trafe povas uzi la vorton «fremdulo» rilate al samspecaj estaĵoj, malgraŭ rimarkindaj sed ne apartigaj diferencoj.

Ne enigu malamon ĉe la infanaj koroj. Por ami la patrujon ne estas necese abomeni tiun de aliaj. En la tuta mondo estimindajn personojn ni devas vidi, sed tio ne povas okazi se interrilatoj mankas. Jen pro kio, senĉese kaj senlace, oni rekomendas al la instruistaro ke ili ampleksigu la lernejon ke kiel eble plej ofte geknaboj el ĉiuj terpartoj kolektiĝu interkomprene antaŭ la alian, forigante la soviniŝmon kies konsekvencoj estas kruelaj militoj per kiuj la batalantoj favorigas la tranĉilajn mastrojn de la mondaĵo financoj.

Utiligu la esperanta lingvon kiel paciga edukrimedo kaj la sukceso estos plena, ĉar per la reciprokaj interrilatoj ni venos en la konkludon ke la homoj devas vivi solidare. Nentu suferigas siajn karulojn kaj pro tio kiam ni havos amikojn kaj kamaradojn en ĉiuj terpartoj, ni ne volos esti premantoj de ili komprenante ke, nek vivi en tiu aŭ alia terzono, nek la koloro de la haŭto estas malestimindaj karakteroj.

E. ARTIGAS.



propagando, instruado kaj disvastigado de la internacia lingvo.

En la monato julio de la jaro 1908^a estis redaktita kaj aprobita la regularo de «Frateco». Esperanta Societo.

Por rememorigi nune la 23^a jaron de la inaŭguro de nia Societo, oni fondas tiun ĉi esperantan bultenon, kies unuan numeron ni dediĉas, kiel oferdono, al la fondintoj de Frateco, kvankam bedaŭrinde jam mortintaj; sinjoroj *Agustín de Montagut*, *Emilio Gastón* kaj *Rafael Benítez*.

Legendo pri Lorelejo

Germana Legendo

Santiago López

Lorelejo estis belega sireno, filino de la rivero Rejno, kiu loĝis sur la roko ankaŭ nomita kiel

ŝi. Pro la perfido de ŝia amito, Lorelejo estis tute rankora kaj igis la ŝipistojn morti.

Kiam ŝipoj alproksimiĝis al la roko, apud la rivero, Lorelejo aperis sur la pinto. Ŝiaj blankaj vestaĵoj kaj ŝiaj longaj oraj briligis ŝian figuron. Krome, per ŝiaj kantoj Lorelejo atraktis la virojn, kiuj celis rigardi al ŝi de malproksime grimpante la rokon. Tiam, la sireno malaperis kaj la viroj mortfalis en la riveron.

La lasta viktimo de Lorelejo estis la juna Ronaldo, kiu estis filo de grava nobelulo de la regiono. Kiam Ronaldo eksciis pri la ekzisto de Lorelejo, li nepre volis koni ŝin. Unun tagon, mensogdirinte al lia patro, ke li eliros ĉasi, Ronaldo insiste konvinkis maljunan ŝipiston veturigi lin sur boato ĝis la roko Lorelejo, malgraŭ la unua malkonsento de la ŝipisto. La boato atingis la proksimon de la roko je la noktigo, kaj tiam la ŝipisto rimarkigis Ronaldon pri la apero de Lorelejo sur ĝi. Lorelejo promenis kvazaŭ ŝvebante sur la roko kaj Ronaldo povis vidi ŝian belan vizaĝon, kiam ŝi malfermis siajn lipojn kaj ekkantis. La belegan kanton igis Ronaldon nepre rigardadi Lorelejon, ĝis iliaj rigardoj

trafis reciproke. Tiam allogon sentis Ronaldo, ke, forgesinte, ke li estis sur boato, li ekiris sur la akvon al la belulino, tial dronante en la riveron.

Tiam okazis forta ŝtormo kaj poste Lorelejo malaperis, restante nur ŝia malproksima kanto.

Kiam la patro de Ronaldo sciis pri la morto de sia filo, li koleriĝis kaj ordonis la kapton de la respondeculino. Soldatoj ŝipverturis ĝis la roko kaj ĉirkaŭigis ĝin. Tiam Lorelejo aperis kaj demandis: "Kion vi serĉas ĉi tie?". La soldatoj respondis: "Vin! Kaj vi ricevos vian punon!". Ŝubite, Lorelejo elŝiris ŝian perlan kolĉenon, tiel kaŭzante fortan ŝtormon kaj grandajn ondojn, inter kiuj ŝi ĉiame malaperis. La korpo de la kompatinda Ronaldo aperis iom poste.

Lorelejo ne plu aperis sur sia roko, sed oni diras, ke ankoraŭ oni povas aŭdi en tiu ejo la ehon de ŝiaj kantoj.

Historio de Togolando

El retejo «MUZAIKO» originale verkita de Adjé Adjévi

Sabino Pelegrín

Ĉar la lando estis koloniita de eŭropanoj, estas ligo inter la historio de Togolando kaj tiu de

Eŭropo. La historio de Afriko antaŭ la alveno de blankuloj okazis antaŭ la deksesara jarcento. La grava paŝo, kaj tre negativa por Afriko, estis la Berlina Traktato de 1884, kiam la eŭropaj potenculoj desegnis la liniojn de la afrikaj ŝtatoj, per multaj rektaj linioj, kiuj havas nenion komunan kun la lokaj etnoj kaj la lokaj registaroj kiuj ekzistis tiam en Afriko. Tio okazis fine de la deknaŭa jarcento.

Tiam Togolando ekkomencis esti invadita fare de Germanio, kaj kiam fine de la Unua Mondmilito, Germanio malvenkis, la venkintoj disdividis inter si la posedaĵojn de Germanio. Unue Togolando estis por la Ligo de Nacioj, sed tuj ĝi transpasis plejparte al Francio kaj eta parto al Anglujo.

Togolando sendependiĝis el Francio en 1970. Ekde 1992 oni komencis celebri la Sendependencan Feston por memori tiun daton.

Togolando havas la francan kiel oficiala lingvo, tamen en la urboj kaj vilaĝoj estas diversaj etnaj lingvoj kiuj estas tre valoraj.

Du el ili estas la ĉefaj (ewé kaj kabijé) sed estas entute kvardeko da lingvoj parolataj en la lando.

En la etnaj lingvoj la afrikanoj konas la plantojn kaj la tradiciajn kuracrimedojn, kaj se tiuj lingvoj malaperos, tiam la nuntempaj konoj de la afrikanoj pri la nacia naturo ankaŭ povus malaperi.

La lingva diverseco estas same grava kiel la biologia diverseco. En la nuna mondo homoj pli kaj pli konsiliĝas pri la valoro de la biologia diverseco kaj pri respekto de plantoj. Ni, la geesperantistoj devas montri la valorojn de la etnaj lingvoj, ĉar en la lokaj lingvoj estas scioj. Se la lokaj lingvoj malaperos, tiuj scioj ankaŭ povus malaperi, kaj tio estus giganta perdo por la tuta homaro.

Maria Salomea Skłodowska-Curie naskiĝis la 7an de novembro de 1867 en Varzovio, kiam tiu parto de Pollando apartenis al la Rusa Imperio. Ŝi estis konata fizikisto kaj kemiisto.

Ŝia patro estis instruisto pri fiziko kaj ŝia patrino estis instruisto kaj pianisto. Ŝi lernis matematikon kaj fizikon per sia patro, kaj poste en kaŝa pola universitato, kiu akceptis virinojn.

En 1891 Maria transloĝiĝis al Parizo kaj ekstudis en Sorbono. Tiutempe ŝi ankaŭ instruis privatajn lecionojn por sin vivteni. Ŝi licenciĝis pri fiziko en 1893 kun la plej bonaj rezultoj tiujare, kaj tuj komencis esploradon pri magnetismo kun Lippmann. En 1894 ŝi ankaŭ gajnis licencion pri matematiko.

Ankaŭ en 1894 ŝi ekkonis Pierre Curie, instruiston kaj esploriston pri magnetismo, al kiu ŝi edziniĝis en 1895. En 1896 Pierre re-



gis ŝian disertaĵon pri la radioj de uranio, antaŭ mallonge malkovritaj de Becquerel. Dum ilia esplorado ŝi uzis la vorton radiaktiveco unuafoje. Mezurante la radiaktivecon de kelkaj mineraloj enhavantaj uranion kaj eltrovante, ke ĝi estas pli alta ol espereble, ili malkovris du novajn elementojn nomitajn polonio kaj radiumo. Pro tiuj esploradoj pri radiaktiveco, Bequerel, Pierre kaj Marie Curie ricevis la Nobel-premion pri fiziko en 1903.

Pierre Curie mortis en 1906 kaj Marie okupis lian katedron en Sorbono. En 1911 ŝi ricevis la Nobel-premion pri Kemio, do ŝi iĝis la unua homo ricevinte du Nobel-premiojn. Dum la Unua Mondmilito, ŝi organizis mansanulejajn servojn pri radiologio. Poste, ŝi daŭre laboris por la Instituto de la Radiumo, fondita de ŝi en 1914, nuntempe nomata Instituto Curie.

Ŝi mortis la 4an de julio de 1934 en Sallanches, Francio, pro aplazia anemio, akirita pro ŝia elmeto al la radioj. Ŝiaj restaĵoj, kun tiuj de ŝia edzo, estis translokitaj al la Panteono de Parizo en 1995.

«**Ŝi estas la unua homo ricevinte du Nobel-premiojn.**»

Kongresoj - 2018



<https://uea.org/kongresoj/UK>



<http://ijk2018.tejo.org/>

Antaŭ mi komencos ti ĉiun artikolon mi devas peti al vi etan aferon: la ciferoj estas 1, 2, 3. Rediru: la ciferoj estas 1, 2 kaj 3. Sed vi devas forgesi tiujn ciferojn, mi rediras al vi ke vi devas forgesi ke la ciferoj estas 1, 2 kaj 3.

Se vi vere forgesos ke la ciferoj estas 1, 2 kaj 3, vi havos donacon fine.

ACT (Terapio de akcepto kaj sindevigo)

Terapio de akcepto kaj sindevigo estas terapio de tiaj nomataj de tria generacio. Ĝia nomo ACT devenas el sia nomo en la angla Acceptance and Commitment Therapy kaj oni devas prononci, kiel act (agu) en la angla. Ĝi estas bazita sur la empiria laboro en terapio. Sed unue ni devas pensi pri la feliĉo. Multaj el homaj problemoj venas de konataj mispensoj. Ofte, la klientoj de psikologia kabineto diras: «mi nur volas esti feliĉa» aŭ «mi volas esti tiel feliĉa kiel la aliaj ŝajnas». Sed, kio estas feliĉo?

La feliĉo

Pri kio ni parolas kiam ni parolas pri feliĉo? Tiu demando estas grava, ĉar kelkaj fojoj ni povas miskompreni la vortojn. Ofte ni uzas «feliĉon» por paroli pri sentoj agrablaj, ĝojaj, gajaj kaj kontentiĝaj. Tiuj sentoj ni nomas «pozitivajn sentojn», kaj ni serĉas tiajn sentojn. Sed tiuj sentoj estas nedaŭraj, efemeraj. La alia signifo de feliĉo estas «vivo plena, riĉa kaj signifoplena». Tiu dua senco estas pli daŭra kaj ankaŭ pli ĝusta por nia vivo. Sed ni, ofte nur volas la unuan kaj forgesas la duan.

La afero estas ja facila: ni devas forgesi la unuan kaj serĉi la duan. Sed kial ni ne trovas la vojon? En la okcidenta kulturo ni trovas multajn kaptilojn. Komence, la feinorakontoj kiuj kutime finiĝis tiel: «... kaj vivis feliĉaj por ĉiam». Sed ĉu la vivo estas tia, kia feinorakontoj?

Unua mito: feliĉo estas la natura stato de ĉiu homo

Preskaŭ 30% el la homoj suferas psiĥiatran malsanon dum sia vivo. Kaj ni ne parolu pri aliaj problemoj: la soleco, divorco, hejma perforto, streso, kolero, ĉikanado.

Multaj homoj vivas pensantaj ke ĉiuj estas pli feliĉaj ol ili mem, kaj ĉi tio faris ilin pli malfeliĉaj.

Dua mito: se vi ne estas feliĉa vi havas iun difekton

La okcidenta socio supozas ke la mensa sufero estas malsano aŭ difekto kaj ĝi estas rezulto el malsana aŭ difekta menso. Sed por la ACT, la problemo ne estas havi negativajn pensojn, sed lerni kiel fari por vivi kun tiaj pensoj.

Tria mito: ni devas lasi la negativajn pensojn por havi pli bonan vivon

En la okcidenta socio, oni pensas ke ni devas forgesi la negativajn pensojn por havi bonan vivon. Sed kiel oni povas lasi tiajn pensojn? Kiel oni povas forgesi la malbonajn pensojn? Kiuj estas la ciferoj? Ĉu vi memoras ilin aŭ ĉu ne? Kiel oni faras por forgesi ion? La unua konsilo kiun donas homoj al kiu suferas estas: «ne pensu tion, forgesu»; sed neniu povas diri kiel oni povas forgesi ion. Kaj oni ne povas diri tion, ĉar ni povas forgesi nenion pravole.

Kvara mito: vi devas kontroli, kion vi sentas, kaj, kion vi pensas

La plimulto de la memhelpaj programoj pensas ke ni povas kontroli penson kaj senton. Tio estas malvero. La pensoj kaj la sentoj evoluis por prepari nin por la sovaĝa vivo. La sentoj estas rapidaj, oni timas aŭ ĝojas nur je sekundoj. La pensoj estas pli malrapidaj sed pli insidaj. Nia menso laboras ĉiam, neniam haltas, nur pensas, ĝi rimarkas danĝerojn, problemojn. Tiu estas sia temo.

Dum miloj da jaroj, niaj mensoj kaj niaj sentoj evoluis por labori tiel. Kaj bone: kiel oni povas ŝanĝi ilin post miloj da jaroj de evoluo? Ĉu ni estus pli frenezaj pensantaj male?

«La okcidenta socio supozas ke la mensa sufero estas malsano aŭ difekta menso.»

Tiu ĉi palaco datas de la duono de la 11-a jarcento, kaj estas unu el la malmultaj kiun oni konservas relative komplete de la arkitekturo hispana-muzulmana, kaj ĝi estis konstruita sub ordono de la dua monarĥo de la Zaragoza Tajfo, Abu Jafar Ahmed al-Muqtadir Billāh, kiu regis la tajfon de la jaro 1046 ĝis 1082, nome la plej longa regado de ĉiuj tajforeĝoj de Al-Andalus. Oni ĝin konstruis kiel distra vilao aŭ "amuza domo" kaj oni nomis ĝin al-Ja'fariJa (Aljaferio) aŭ Qasr Dār al Surūr (palaco de la Hojo), ĉe kies belaj salonoj okazis la oftaj festoj de la regno, kaj kie la grandaj poetoj, kiujn al-Muqtadir malavare protektis, verkis kaj recitis la plej bonajn poemojn.

Tiu reĝo, al-Muqtadir, amis la sciencon kaj poezion, kaj la historiisto al-Saqundi (naskiĝinta en 1231) diras en sia verko "La hispana islamo": "Vi havas reĝon, al-Muqtadir, sinjoro de Saraqusto, vere mirinda saĝulo pri astronomio, filozofio, geometrio kaj poezio". Efektive, elstara matematikisto, li verkis ankaŭ belajn poemojn, kaj al la palaco Aljaferio, kiun li ordonis konstrui li dediĉis versojn.

Post longa regado (34 jaroj) forpasis al-Muqtadir kaj okupis la tronon de Saraqusto sia



Ekstera vido de la fosaĵo

filo al-Mutamin, homo kun profunda inklino al studado, vera intelektulo, pri kiu oni scias ke li estis elstara matematikisto kaj poeto. Oni ankaŭ scias ke li multe amis celebri dumnoktajn festojn ĉe la rivero Ebro, kaj la kronikisto Fath ibn Jaqān rakontis pri unu el ili: "La ŝipeton de la princo ĉirkaŭis multnombraj barkoj; la melodioj de la kordinstrumentoj (precipe liutoj) estis tiel belaj, ke la navigantoj sin sentis devigataj halti por ĝui la magion de tiuj sorĉaj muzikoj kaj ofte mutiĝis ĉar krom la muziko ofte oni recitis belajn versojn, kiel tiuj de Ibn Hasdāy.

Post la konkero de Zaragozo fare de Alfonso la 1-a en la jaro 1118, la Aljaferio restis kiel sidejo de la kristanaj monarĥoj, kiuj ofte remodeligis kaj ampleksigis ĝin supermetante novan etaĝon sur la muzulmana konstruaĵo. La plej gravaj konstruoj estis tiu sub regado de Pedro la 4-a dum la 14-a jarcento, kaj precipe tiu de la Katolikaj Gereĝoj je la fino de la 15-a. Ankaŭ dum tiu kristana epoko, la Aljaferio estis scenejo de multnombraj festoj kaj celebradoj, kaj post tiu hela epoko ĝi estis sidejo de la Inkvizitora Tribunalo, kiu okupis la palacon ĝis 1706.

Malsupre kaj, maldekstre, oni konstruis apartan ejon kie nun funkcias la parlamento de Aragono.

Post multaj jaroj de forlaso, la Belarta Ĝenerala Direkcio de Hispanio komencis ripari kaj restarigi la palacon Aljaferio, kaj tiel estis kiel iom post iom reaperis la belegaj profiloj de tiu bela muzulmana palaco.



Interna kolonaro.

Forpasis Vicente Garcés Puyuelo.

La 13an de marto, surprize, li mortis. Li estis en hospitalo pro kormalsano.

Li lernis Esperanton tre juna, kaj baldaŭ ekpartoprenis en diversaj kongresoj, ekzem-


ple en Universalaj Kongresoj en Kubo kaj en Valencio (Hispanio).

Membro de "Frateco" de antaŭ multe da jaroj, dum unu jaro li estis prezidanto de nia asocio.

Fotoj



1982 - En alcazaba parko, dum la Hispana Esperanto-Kongreso en Malago.



Libroservo. De maldekstre dekstren: la fratecanoj Miguel Ángel, José Vicente kaj Pablo.